

## **Lusin: Antimilitisto**

Lusin estas la plumnomo de sinjoro ZHOU Shuren (1881.9.25----1936.10.19), unu el la plej elstaraj ĉinaj verkistoj de la dudeka jarcento kaj la fondinto de la ĉina moderna vulgara ĝenro.

La verko de Lusin profunde influis la Movadon de la Kvara de Majo (1919), kiam Ĉinio transformiĝis literature kaj politike. Lusin estis ankaŭ fama tradukisto, kiu konigis la mondan literaturon al Ĉinio.

En 1963, Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) eldonis Plenan Kolekton de Lusin: NOVELOJ DE LUSIN. En la libro estas novelo **Antimilitisto**, bazita sur la klasikaĵo de Mozio.

Mozio (470 a.K ---- 371 a.K ) estis la ĉefa proponanto de filozofia skolo nomita laŭ sia nomo, Mohismo, Moismo aŭ Moziismo, kies ĉefa penso havas apartajn ecojn. Interalie, la tezoj “Homamo” kaj “Neatako” estas simple kompreneblaj kaj vaste akceptataj de miloj da jaroj.

Laŭ la penso “Neatako” de Mozio, milito mortigas kaj homo bezonas amon. Pro tio li kontraŭas agresmiliton. Lusin verkis en 1934 la novelon, kiun ni esperantistoj legas kun la titolo “**Antimilitisto.**” En la Plena Kolekto ĝi troviĝas en parto de “Malnovaj Legendoj Nove

Redaktitaj.”

La aŭtoro esprimis sian malaprobbon al tiama socia maljusteco, rakontante la historion, ke siatempe Mozio vagadis inter kelkaj landoj por persvadi la reĝon de potenca Ĉu-regno ne ataki la malgrandan Song-regnon. Li sukcesis en tiu persvado. Lusin en sia verkado elstarigis la opinion kontraŭ agresa milito kaj pledas por sindefendo de malgranda regno.

Oni opinias, ke **Antimilitisto** de Lusin estas la novelo kun la plej multaj verboj ---- por disvolvi la intrigon----de la monda literaturo. La ĉefa figuro Mozio ekaperas per sia hasta agado kaj eĉ ne ripozas onon da momento laŭlonge de la rakontado. En konstanta agado esprimata de unu verbo post la alia, la agadisto Mozio ekstaras kaj ĉiam alkuras survoje por bremsi militon. Li sin ĵetas en la maljustan mondon de ĉikanado kaj perforta altrudado kaj streĉite okupiĝas por malhelpi sovaĝan kruelon, malmultigi vundojn inter militontaj regnoj, evitigi la disiĝon de familioj dum la milito.

Laŭ Lusin, Mozio reprezentas figuron meritnomatan kiel la “Nacia Spino.” Sed li estis malbone traktita post kiam li sukcesis preventi la militon. Revenante hejme, survoje tra la lando de Song-regno, li estis traserĉita dufoje kaj, alproksimiĝante al la ĉefurbo, li devigite oferis sian spartecan pakajon al kolektantoj de landsava donaco, eĉ estis forpelita el la urbopordego, sub kiu li ŝirmis sin kiam pluvis.....

La lingvaĵo de la novelo ĝenre montras la bazan stilon de Lusin:  
lakona, solida kaj pensiga.

Plena Kolekto de Lusin estas tradukita de ĉinaj veteranaj esperantistoj  
S. J. Zee, Venlo Fan kaj Tikos ktp. Provlegis ĝin tiam elstaraj aŭtoroj  
Hilda Dresen (Estonio), Teo JUNG (Germanio) kaj G. J. Degenkamp  
(Nederlando). La novelo proponita literature igas la legosperton plezura.

2022.11.10